

Heinrich Heine,

## Du fratoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sur la monta pint' situas  
Noktvelite la kastel';  
Sed envale triste bruas  
Fulmaj glavoj en malhel'.

Estas fratoj batalantaj  
Furioze en duel',  
Per la glavoj sin batantaj.  
Kial tiu ĉi kverel'?

La kverelo incendiĝis  
Per rigardo de grafin';  
Ambaŭ arde enamiĝis  
Al la bela nobelin'.

Sed al kiu el la fratoj  
Ŝia kor' alturnu sin?  
Cerbumado ne, nur battoj  
De la glav' decidis ĝin!

Estas ili skermadantaj  
Furioze kontraŭ sin.  
Gardu vin, ĉar kaŝ-irantaj  
Fi-demonoj trompos vin!

Ve, vi sangaj uloj frataj!  
Ve, vi sang-avida val'!  
Ambaŭ estas mortigataj  
De la aliula ŝtal'.

Forbloviĝis la jarcentoj  
Post terura la duel';  
Entombiĝis multaj gentoj,  
Ruiniĝis la kastel'.

Sed en jena val' senbrua  
Dum la nokto demonar'  
Ĉirkaŭiras, je l' dekdua  
Ekbatalas la frat-par'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Zwei Brüder" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-01-27.*

*MR-119-1 / Arg-213-420 (2004-03-14 13:39:35)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romanoj“, n-ro III.*